OFICIALA ORGANO
DE S.A.T.

SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO! LANTI

# Sennaciulo



## KELKAJ ASPEKTOJ DE NUNTEMPA AGRIKULTURO

Sennaciulo, januaro/febeuaro 2008, n°1/2 (1231/2) ,MENSUEL/MONATA, ISSN 1163.0442, prezo 5 €

# Kongreso de SAT 2008
# Roza Valo kaj muzeo de rozo



*Sur la fotoj: La rikoltado de la rozoj.*



Kiel vi verŝajne jam sciis, nia kongresurbo troviĝas en la






tiel nomata Roza Valo kie oni grandkvante produktas rozojn. Ĉiusomere estas granda spektaklo



kiam oni rikoltas rozojn por la industria preparado. Dum unu el niaj ekskursoj, ni vizitos inter alio la Muzeon de la rozo.

Kazanlak estas fama pro la aroma oleodona rozo. Proksime de la urbo troviĝas Instituto pri la eteraj oleodonaj plantoj kaj muzeo de la rozo.

En ĝi oni povas vidi kiamaniere oni kreskigis la rozojn kaj produktis rozojn antaŭ jaroj kaj nun. Estas eksponitaj diversaj iloj per kiuj oni laboris sur kamparo. Fotoj, dokumentoj kaj objektoj rakontas pri la historio de la rozkultivado kaj oleoproduktado.



Karaj kamaradoj,

Jen la januara-februara numero de Sennaciulo, kiu konsistigas unuan provon pri aperigo de dumonataj numeroj. La martaj kaj aprilaj numeroj denove estos monataj, kaj plia dumonata numero aperos en majo-junio. Ni rememorigas, ke la celo de ĉi tiu provo ne estas redukti la asociajn servojn por monŝparado, sed proponi gazeton iom pli kvalitan, donante al la kontribuantoj kaj redaktantoj la eblon labori en malpli prema ritmo. Viaj komentoj pri la sukceso (aŭ malsukceso) de ĉi tiu provo estas jam nun bonvenaj.

En decembro vi ricevis la aliĝilon por la kongreso. Se ne jam farite, provu laŭeble rapide aliĝi, por helpi al la OKK en siaj prepar-laboroj. Viaj proponoj pri temoj kaj enkondukantoj por la ses sociaj forumoj okazotaj dum la kongreso ankaŭ estas bonvenaj. Sendu ilin al la PK.

Bonvolu ankaŭ atente legi la komunikon de la PK sur paĝo 29, kaj eventuale anonci vin por partopreni en la ĜK-aro aŭ en la PK dum la periodo 2009-2012. Ju pli multaj la kunlaborantoj, des pli eltenebla kaj efika la tasko.

Venontaj dosiertemoj estos:

En marto:

**Naciecaj problemoj**

Kontribuojn sendu al Gary Mickle,
Brüsseler Str. 6, DE-13353 BERLIN,
Germanio
rete: <gmickle@negxo.de>.

En aprilo:

**Historio**

Kontribuojn sendu al Tonyo del Barrio,
Inspector Juan A. Bueno 11-7° D, ES-28924
ALCORCON, Hispanio
rete:<tonyodelbarrio@gmail.com>.

(Vidu artikolon, paĝo 21).
Kamaradece,
La redaktoskipo



# Kelkaj aspektoj de nuntempa agrikulturo

## Enkonduke

Kiam mi lastan fojon tuŝis per miaj manoj teron? Kiom ofte?
Ĉi demandoj sendube spegulas la rilaton al la tero, kiun ĉiu el ni spertas. Rekta rilato al la tero estas unu flanko de nia vivo. Alia flanko estas manĝado. Ĉiu el ni ne povus transvivi sen tio, ke homoj kulturas teron kaj bredas bestojn.
Agrikulturo - kiu kunigas kaj bredadon kaj ter-kulturadon - estas la homara vivo-fonto. Agrikulturo travivis grandajn ŝanĝojn dum la du lastaj jarcentoj sed ili tute ne okazis ĉie kaj sammaniere.
En la industriiĝantaj landoj, de la 19a jarcento estis agrikultura revolucio enkondukinta maŝinojn kaj kemiaĵojn. En t.n. "disvolviĝantaj landoj", estis verda revolucio (1945-1970), kiu enkondukis maŝinaron, kemiaĵaron kaj alt-rendimentajn plantojn, tiuj novaj iloj disvolvitaj en industriigitaj landoj dum la intermondmilita periodo. Sed tiuj du revolucioj tuŝis nur la plej riĉajn kamparanojn kun sufiĉe da kapitalo por aĉeti la modernajn produktilojn.
En la tuta mondo, estas 28 milionoj da traktoroj, kio reprezentas malpli ol 2% el la tuta nombro da agrikultur-laborantoj.
Malegala ilaro estigas malegalan produktivecon: unu agrikulturisto per ilaro de agrikultura revolucio produktas 2000 tunojn da cerealoj jare. Unu agrikulturisto profitanta el verda revolucio (ili reprezentas ĉirkaŭ du trionojn el la tutmonda agrikulturistaro) aŭ disponas je best-forto por treni ilaron kaj tiel produktas ĉirkaŭ 50 tunojn jare da cerealoj, aŭ disponas nur je propra forto kaj man-ilaro kaj tiel produktas nur 10 tunojn jare. Restas unu triono (400-500 milionoj) el la agrikulturistaro, disponanta nek pri agrikultur-revolucia aŭ verd-revolucia ilaro, nek pri besta forto, uzanta nur bazan ilaron kaj kultivanta planto-variojn kaj bredanta best-rasojn konintaj neniun selektadon. Unu tia agrikulturisto produktas maksimume 1 tunon da cerealoj jare.
Kapitalismo trudas al tiuj ege diversaj agrikulturistoj interkonkurenci en unu sama tutmonda merkato... Kaj malaperadas la malplej riĉaj agrikulturistoj (ili foriras aŭ estas elpelitaj el siaj teroj kaj iras en malriĉajn urbajn kvartalojn aŭ - ne malofte - memmortigas sin), ĉar ili ne povas konkurenci la plej riĉajn. Kaj tiu malaperado de agrikulturistoj okazas ĉie sur nia planedo, en industriigitaj same kiel en tre ruraj mondregionoj.
Kaj la agrikultur-industrio (fabrikanta kemiaĵojn, genetike modifitajn semojn kaj transformanta cerealojn, lakton, ktp por nutri malbonkvalite kaj "malmultekoste" la homaron kaj precipe por elsuĉi el ĉilasta ĉiajn monprofitojn) pli kaj pli regadas agrikulturon. Do homaran manĝaĵon. Do nian vivon.
En nia dosiero, vi trovos diversajn artikolojn, kiuj ĉiuj lumigas nur partojn de la agrikultura problemaro nuntempa, sed donos al vi - ni esperas - pli precizan ideon pri kio estas okazanta nun en ekonomia sektoro, kiu ebligas al ni manĝi, vivi.

Robin BETO

Sennaciulo
OFICIALA ORGANO DE S.A.T
Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redaktejo: 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, tel. +33.1.47.97.87.05; telekopiilo: +33.1.47.97.71.90. Free: +33.9.50.71.01.97; Retadreso: satesperanto@free.fr.; TTT-paĝoj: http://www.satesperanto.org.; Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.
IBAN :FR41 1000 0101 2342 2K02 064 - BIC: PSSTFRPPPAR
Konto de SAT ĉe UEA : satx-s
Plenum-Komitato de SAT :
Prezidanto : Jakvo Schram
Ĝenerala Sekretario : Krešimir Barković
Kasistino : Thérèse Sabatier
Membroj: Jacques Bannier, Guy Cavalier, Gérard Lieblang, Vinko Markovo, Arturo Prent.
Redakta Komitato - Cyril Orsingher,Tonyo Del Barrio, Viola Ando Murasaki, Djémil Kessous, Petro Levi, Gérard Lieblang, Vinko Markovo, Vito Markovo, Nikolao Gudskov, Gary Mickle, Jacques Schram, Hans Georg Kaiser. Provizora ĉefredaktoro kaj enpaĝigisto: Krešimir Barković. Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de la redaktejo.
9 771163 044279
Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.
Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas. La limdato de ricevo de manuskriptoj estas la 10-a de kuranta monato.

❐

Imprimé par : TROISA, 4 rue Théodule Ribot, FR-75017 Paris. Aperas monate - Mensuel. Le directeur de la Publication: Jacques BANNIER; Abonnement annuel/jara abono France 55 €.
Autres pays/aliaj landoj : peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.
Dépot légal à la date de parution. N° CPPAP 0510 G 86567